GISTO, JUN,2007
ottovaske@ibest.com.br
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiubo-RS
ttt-kongrua skribo

@@@

KIEL DIRI?

Farigxas preskaù popularaj esprimoj el la angla kaj invadas nian nacilingvon. Domagxo, Niaj vortaristoj ne scias inventi taùgan surogatan kunmetajxon. Kiel ekzemplon mi prenas la artisman kapablon de viro, kiu per siaj lertaj vortjxonglajxoj amuzas publikon dum minimume tuta horo. Mi neniam aùdis difinon nacilingvan por tiu arto. Jxurnaloj, revuoj nur registras ONE MAN SHOU.(chu, uon man sxaù?), Nu, kiel vi tradukus tiun difinon?- Serchu mian proponon aliloke.

PLEJ EMOCIIGA SCENO

Chiu Gisto-legando sentu sin invitata surpaperigi kaj sendi al mi tekston pri sceno la plej emociigan kiun vi spektis per TV aù en kinejo. Min profunde tusxis la koron la sceno spektita en Serche de Oro, kun Chaplin kaj skipo (certe chiuj vi vidis la filmon): Altnivelaj dancistinoj vizitas la tre modestan hejmon de Chaplin. Li prezentas al ili supozatajn dancistinojn el etaj panoj, fiksitaj per forkoj, sur la tablo. La grupo tre amuzigxas kaj manifestas fortan simpation al li, chefe unu el la grupo rolas kvazaù amindumon kun li. Reciproke li estas invitata iam viziti ilin en la luksa dancejo. Dum la alveno, ankoraù che la enirejo, li ekvidas sian “amatinon” sed samtempe eniras grupo da viroj. Unu el la grupo estas la vere preferata de la koncerna dancistino. Sxi vibras pro gxojo, ke li alvenis, svingas sian manon, diras bonvenajn vortojn kaj rapidas renkonten al “li” kun sia rigardo fiksita samdirekte al Chaplin kaj al la alia viro. Shi kuras, preskaù kunpusxigxas kun Chaplin sed pluiras ricevi brakumon de sxia alia amiko. Chiuj spektantoj profunde sentas en la koro la terure grandan seniluziigxan baton suferatan de Chaplin. La spektantoj tre kompatas lin.

Aldonas mi: vi, junaj kaj belaj homoj eble ne kapablas kompreni kaj kunsenti la amaran seniluziigxon tamen mi, de adoleskanteco, 12 jara lernejano, estis daùre primokata kaùze de mia malbela figuro krom la fakto ke mia nacilingva prononco estis acha, pro tio ke mi hejme parolis la germanan. Tial mi neniel sukcesis kalkuli koleginan simpation. Nur sekrete, sen ke la kolegino suspektis mi rajtis ami sxin...hi...hi .- Mi rakontas chi tion, por ke la leganto pli gxuste situu sin en la cirkunstanco, kiun mi sentis kiel spektatoro de sceno kvazaù okazas al mi la preskaù agresa ignoro de mia cheesto en la dancejo. – BV rakonti vian travivajxon.

Bonhumoro:

MISKOMPRENO

Kara amiko, mi ege gxojas renkonti vin, mi forgesis hejme mian posxmonujon. Chuvi bonvolas pruntedoni al mi 100 dolarojn?...tuj poste mi redonos ilin al vi.

- Domagxe, ne eblas tamen mi vin helpos. Jen unu dolaro por busbileto.Per gxi vi povas veturi hejmen kaj alpreni vian monujon.

PAPAGO

(Sklavigi animalojn estas fikrimo)

Iu achetis papagon, laùdire paroleman sed gxi restadis muta. La nova posedanto pensis: mi instruos al gxi diri kelkajn vortojn kaj...ekzempligis: Halo’, Halo’, Halo’. Gxi nur gapis pacience sed la viro obstinis: Halo’, Halo’. La bela birdo agacigxis. Gxi diris – Neniu hejme!

Mia propono por “Kiel diri?”.
Pli taùga en Esperanto char la prezento povas okazi far viro aù virino.

Solhoma prezento

Kiel vi mem pinias?